

Vorto kaj vortelemento en Esperanto - de István Szerdahelyi.
La 10-a kajero de la kolekto Studoj de KCE
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 705, 1977.04.13 & 15 & 16

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ekde la jaro 1975 intime kunlaboras la revuo Literatura Foiro kun Kultura Centro Esperantista. Kaj fine de la pasinta jaro tiu ĉi kunlaboro esprimiĝis per komuna eldono de tre grava verketo de doktoro István Szerdahelyi, esperanto-profesoro en la Budapeŝta Universitato Eötvös Loránd. Bela triangula kunlaboro finna – hungara - svisa, landoj, kie nuntempe troviĝas la sidejoj de la kunlaborantaj organizaĵoj.

A.- Aperis la eldonitaĵo en la kolekto ‘Studoj’ kiel deka kajero sub la titolo ‘Vorto kaj vortelemento en Esperanto’.

Cl.- Kiel la titolo bone indikas, temas pri studo de la vortfarado en Esperanto. Doktoro Szerdahelyi proponas la forlason de la teoriaj proponoj de la Akto de la Akademio de Esperanto por reveni al la originala zamenhofa sistemo, kiu estas, kiel li diras, multe pli simpla, pli konsekvenca, pli konforma al la lingvosistemo, sekve multe pli scienca kaj pli valora el praktikaj vidpunktoj.

A.- Kiel skribis sinjoro Tazio Carlevaro en postparolo : « ni salutas en tiu laboro la verkon ne de rompanto, sed de sincera esploristo, kiu klopodas apliki al Esperanto la kriteriojn, kiujn la ĝenerala lingvistiko ellaboris por la etnaj lingvoj. »

Cl.- Anstataŭ resumi tiun ĉi 14-paĝan densan eseeton, ni cite legos al vi ĉapitron, kiu titolas ‘Le ekesto de Esperanto’. Eble tiu ĉi laŭtleĝo donos al vi la deziron pli atente trastudi la verketon Vorto kaj vortelemento en Esperanto de doktoro Istvan Szerdahelyi.

A.- Ni citas: «Ĉiu lingvo estas siaspeca modelo de la nin ĉirkaŭanta realaĵo. La realaĵoj vortiĝas en la aŭtonomaj vortklasoj, dume la ceteraj parolelementoj servas ĝenerale por ilia interrilatigo inter de la sistemo mem.»

Cl.- Estus tamen erare pensi, ke la mondo estas granda magazeno de konkretaĵoj kaj abstrakaĵoj kaj ke la vortoj estas iliaj simplaj etikedoj (Martinet). En ĉiu vortkapo kaŝiĝas tuta retaro da signiferoj: rektaj kaj transaj, konkretaj kaj metaforaj.

A.- Kiam Zamenhof konstruis internacian lingvon por solvi pere de ĝi la interlingvan embarason, li ne konstruis tute novan, ĝis tiam neektistantan modelon, sed akceptis la jam ekzistantajn kaj de la konatajn lingvajn modelojn: li ne inventis, li nur elektis el la inventaro de la diversaj, precipe eŭropaj lingvoj. Ekzemple: por tiu meblo, ĉe kiu oni manĝas aŭ skribas, li elektis la vorton el la franca lingvo table-tablo, same el la franca brosse-broso.

Cl.- Tamen ni nepre substreku : Zamenhof enkondukis en la novan lingvon ne vortelementon sed vorton. Vortelementon li ne povis transpreni el la fontlingvo, li povis transpreni nur plenan, memstaran vorton. La ekstrakto de la radikmorfemo el la vorto estis jam la dua operacio. La unua operacio, la transpreno de la vorto el la fontlingvo, okazis inter la du sistemoj. Inter la fonto kaj nova, konstruiĝanta sistemo. La dua operacio: la ekstrakto de la radiko el la vorto okazis interne de la nova sistemo.

A.- Tion pruvas ankaŭ la nuntempa enkondukado de neologismoj: oni enkondukas ne la radikon nilon sed la vorton nilono, ne la radikon dur sed la sinonimon de malmola, dura. Plene pruvas tion ĉi nian supozon la enkonduko de etnonimo harakiri, kiu en tia originala formo envenis en Esperanton kaj, kvankam en la fontolingvo kaj en ĉiuj aliaj lingvoj, kien ĝi eniris estas substantivo, en Esperanton, pro la formala i-finaĵo, envenis kiel verbo.

Cl.- Por klare priskribi esperanton oni distingu inter la vorto kaj vortelemento. Vortspecon havas nur la vorto, nur ĝi povas esti parolelemento. La finaĵo ĉe aŭtonomaj vortoj ne estas pleonasma. Ĝi portas la gramatikan/funkcian informadon apud la semantika-leksika informado de la radiko. La aŭtonomaj vortoj, substantivo, adjektivo, verbo, en esperanto estas ĉiam minimume du-elementaj; tablo, peri, eta kaj tiel plu. En la novan sistemon Zamenhof enkondukis ne vortelementojn, sed vortojn : li kvazaŭ tradukis la fontvorton en Esperanton, la substantivon 'brosse' je broso.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*